ANTAŬPAROLO

18-A JARKONFERENCO „DIREKTADO DE EKOLOGIA PROTEKTADO“, 26. – 27. MARTO 2018, BRATISLAVO

Stano MARČEK

Ekologia protektado dinamike evoluas kaj fariĝas grava parto de la socia vivo. La rapide kreskanta homa populacio plialtigas siajn materian kaj energian konsumadojn kaj minacas transpaŝi la elteneblan kapablon de la planedo. Globalaj mediaj problemoj havas daŭre malboniĝantan tendencon, ekzemple malmultiĝas naturaj arbaroj de la modera mondozono, subtropikoj kaj tropikoj, ŝrumpiĝas la agro, rezulte de ĝia degenerado, kreskas maraj polucioj, detruiĝas vundeblaj maraj ekosistemoj, senrevene malaperas plantaj a bestaj specioj. Al gravaj elementoj de la politiko de mediprotekto kaj daŭrigebla evoluo, aplikitaj fine de la pasinta jarcento kaj nuntempe, apartenas tendencoj antaŭenigi strategion de daŭrigeblaj aliroj. Konforme al tiu aliro iom post iom aplikiĝas klopodoj transiri de vivmediaj problemoj post ilia ekesto al solvoj teknike preventaj kaj daŭrigeblaj en la tuta vivciklo de la technologio kaj produktado. Iom post iom ŝanĝiĝas konduto de la produktantoj kaj konsumantoj kaj per kreskanta tendenco aplikiĝas preventivaj principoj, volontula principo kaj partopreno de la publiko en solvado de problemoj ĉe defendado de la vivmedio. Realiziĝas sistemoj kiel prizorgi la vivmediojn ĉe industriaj kaj produktaj agadoj, pli grandan atenton oni dediĉas al influo de la produktoj mem (kiel produktoj de konsumado, duonvaroj kaj materialoj) al la ekologia vivmedio.

Lastatempe sur la kampo de ekologia vivmedia politiko signife vastiĝis spektro da volontulaj aliroj ĉe defendado de la vivmedio. Aperas tendencoj plialtigi diversecon de la instrumentoj, bazitaj en signifa mezuro sur memvolaj aktivecoj de la produktantoj kaj la kreskanta konscio de ĉiuj interesiĝantoj en la kampo de defendado kaj kreado de ekologia vivmedio. Pluraj proceduroj estas laŭgrade normigitaj. Samtempe kun ilia praktika disvastigo komenciĝis ilia esploro, celita ne nur al esploro de iliaj teoriaj aspektoj, sed ankau ĝeneraligoj de praktikaj spertoj, akiritaj el individuaj studoj.

Ekologia protektado prezentas aktivecojn, per kiuj oni preventas malpurigadon aŭ difektadon de la vivmedio, aŭ oni la malpurigadon aŭ difektadon limigas kaj forigas. Ĝi kovras protektadon de ĝiaj individuaj komponantoj aŭ konkretaj ekologiaj sistemoj kaj iliaj reciprokaj interrilatoj, sed ankaŭ protektadon de la vivmedio kiel la tuto. Protektado de la vivmedio kaj direktado al tia evoluo de la socio, kiu permesos ekonomian disvolviĝon, plialtigon de la vivnivelo kaj samtempe konservos la naturon kaj fontojn por estontaj generacioj, postulas ekkonon de la nuna situacio. Ekkono de la kialoj, kiuj kaŭzas problemojn

en la vivmedio kaj la eblecoj kiel protekti, respektive kiel por sentoksigi la ŝarĝojn en la vivmedio, povas kontribui al ŝanĝo en la rilato ne nur en la produktado, sed ankaŭ konsumado. La rezulto de tia ekkono devus esti kvalite pli akceptebla proksimiĝo al ĉerpado de fontoj, en la produktado kaj konsumado, sed kiu ne ekestus rezulte de ordonoj kaj malpermesoj, sed surbaze de la natura homa ekkonado.

La atendata disvolviĝo de la homa socio kaj la al ĝi rilatanta kreskado de la kvanto de sekurecaj minacoj kontraŭ gravaj interesoj de la socio kiel la tuto, sed ankaŭ registaraj kaj ne registaraj institucioj, firmaoj kaj civitanoj, alportas daŭre kreskantajn pretendojn al la nivelo de la sekurecaj normoj kaj samtempe ĉi tiun altan normon daŭre minacas. La altan sekurecan normon oni povas ĉe la senĉese evoluanta socio daŭrigi, nur se la kvanto da sekurecaj akcidentoj daŭre malpliiĝos. Por tio estas neeviteble bezonata nova ampleksa sistemo de scioj, aranĝoj kaj rimedoj, kiu proponas unuecan sekurecan solvon. La baza principo estas aktiva solvado de sekurecaj de mandoj. La defio estas senĉesa evitado kaj preventado de krizaj situacioj kaj akcidentoj. Estas neeviteble, ke ĉiuj subjektoj, al kiuj la sekureco rilatas, dediĉu adekvatan atenton al sekurecaj aferoj, kaj praktike apliku direktadon de la sekureco.

Baza orientiĝo de la tegmenta direktado ĝenerale, koncernanta la kompleksan sekurecon, devas esti determinita per sekureca politiko de la konkreta subjekto. Surbaze de direktado de riskoj ĝi reagu al la ekestintaj nedeziratajn fenomenoj de la difinita sekureco kaj preventu ilin ĝis akceptebla nivelo de riskoj. Tia efektivigo de sekureca politiko devus realiĝi per metodoj kaj instrumentoj de protektado sur fundamento de la jura kadro, bazita en sekureca dokumentaro. Kompreneble nek sekureca direktado povas garantii absolutan forigon de ajnaj riskoj, akcidentojj kaj krizaj situacioj. Sed ĝi ofertas novajn kaj pli bonajn eblecojn, manierojn kaj metodojn por preventi eblajn kaj potencialajn riskojn.

Celo de la konferenco "Direktado de Ekologia Protektado 2018" estas provizi taŭgan platformon por informi la fakan kaj sciencan publikojn, reprezentantojn de la loka registaro kaj ŝtata administrado, interŝanĝon de spertoj kaj prezenton de novaj rezultoj en la problemaro de la direktado de ekologia protektado.

CONTACT ADDRESS

Stano MARČEK
Zvolenská 15/21, 036 01 Martin, Slovakio
Redaktoro de la revuoj
Juna Amiko kaj *Esperanto aktuell*
Membro de Akademio de Esperanto
Stano.marcek@gmail.com